Vizaĝo al vizaĝo

En februaro ĉio vivanta haltiĝis.
La birdoj malvole flugis kaj l'animo
alskrapis la pejzaĝon kiel boato skrapanta
la kajponton, al kiu ĝi estas ligita.

La arboj staris dorsoflanke al ni.
La neĝalto mezuriĝis laŭ mortaj tigoj.
La piedspuroj maljunis sur la neĝokrusto.
Sub baŝaro degelis la lingvo.

Iun tagon alvenis io al la fenestro.
La laboro haltiĝis, mi alrigardis.
Brulis la koloroj. ĉio turniĝis.
La grundo kaj mi eksaltis renkonten.

Tomas Tranströmer

Tradukis al esperanto: Franko Luin

El la kolekto "Spuroj de miaj paŝoj,
Iom da poezio originala kaj tradukita"
de Franko Luin, paĝo 48,
eLibro eldonita de Omnibus/Inko,
kopirajto nur por interreta legado surekrane.
isbn 91-7303-098-8
http://i-espero.info/files/elibroj/